

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperantomovado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajn. Se vi tamen ne volas ricevi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. ĈEA-KONGRESO EN ŜUMPERK
2. MUZEA NOKTO EN SVITAVY KUN INAŬGURO DE NOVA EKSPozICIO
3. GRAVAJ INTERNACIAJ ARANĜOJ EN ĈEĤIO
4. LA ESPERANTO- KLUBOJ JUBILEAS
5. AdE-KONSULTEJO JE DISPONO
6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS
7. MALLONGE
8. ESPERANTO-KALENDARO – PETO PRI INFORMOJ

1. ĈEA-KONGRESO EN ŜUMPERK 2011-10-07/09

La kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio okazos de la 7-a ĝis la 9-a de oktobro en nordmoravia urbo Ŝumperk. Tie ankaŭ finiĝas la funkciperiodo de nuna gvidantaro (komitato kaj kontrola komisiono) do oni elektos la novan por la sekvaj tri jaroj. La elektokomisiono laboras en la konsisto Petro Chrdle (gvidanto), Věra Podhradská kaj Marek Blahuš. Kiel scias la partoprenintoj de la pasintjara ĈEA-konferenco, oni ne nur kolektas kandidatojn, sed ankaŭ preparas novan elektoregularon.. Sinproponoj kaj proponoj de la kandidatoj bonvenaj, bv. uzi la retadreson chrdle@kava-pech.cz. Pli da informoj kaj aliĝilon oni trovos ĉe www.esperanto.cz aŭ skribu al la komitatano respondeca pri konferencoj kaj kongresoj Jiří Tomeček <tomecek@esperanto.cz>.

2. MUZEA NOKTO EN SVITAVY KUN INAŬGURO DE NOVA EKSPozICIO

La kvaran de junio okazas en Svitavy Muzea Nokto, dum kiu estas senpage viziteblaj kaj la Urbaj Muzeo kaj Galerio, kaj la Esperanto-muzeo. En ambaŭ atendas la vizitantojn riĉaj programoj. En la Esperanto-muzeo okazos i.a. inaŭguro de nova ekspozicio Spiritaj tradicioj kaj Esperanto. Interesiĝantoj pri tranokto en studenta domo kontraŭ 200 Kč/nokto aliĝu ĉe Libuše Dvořáková dvor.libuse@seznam.cz plej malfrue ĝis la 30-a de majo. Pli da informoj inkluzive de la programo kaj en la Esperanto-muzeo, kaj en la Urbaj Muzeo kaj Galerio vi trovos ĉe www.esperanto.cz

3. GRAVAJ INTERNACIAJ ARANĜOJ EN ĈEĤIO

Internacia Fervojista Kongreso en Liberec 2011-05-7/14: Proksimiĝas dato de la 63-a Internacia kongreso de IFEF dum tagoj de la 7-a ĝis la 14-a de majo 2011 en Kongresa Centro Babylon en Liberec, Ĉeĥio. Kiu interesiĝas ankoraŭ partopreni, bonvolu sendu informon al sekretariino de LKK sinjorino A. Abelovská (AnnaAbelovska@seznam.cz). Estas eble partopreni almenaŭ solenan malfermon dimanĉe la 8-an de majo 2011 je la 10-a horo matene. Tiukaze ankaŭ sendu informon al la indikita adreso. Programon vi povas legi en retadreso: www.ifef.wz.cz. Informas: LKK-prezidanto Ladislav Kovář kovar.lad@email.cz

Internacia kongreso de LIBE en Olomouc 2011-07-14/21: LIBE = Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. Programo kaj detalaj informoj preparatas, interesiĝantoj pri kunlaboro kaj helpo dum la preparo de la aranĝo bonvenas. Kontakto: priborsky@volny.cz

KELI-kongreso en Poděbrady 2011-08-02/09: Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia okazos ĉi-foje nurajn 50 km oriente de la ĉefurbo Prago, en ĉarmetosa kaj trankvila banloko Poděbrady. Dum ĝi okazos prelegoj kaj diskutoj, diservoj, ekskursoj, kultura programo. Kontakto: cea.polnicky@quick.cz

Internacia renkontiĝo de filatelistoj kaj esperantaĵ-kolektantoj en Prago 2011-09-08/11: La renkontiĝon organizas IFA/IREK kunlabore kun la Kongresa kaj kleriga agentejo KAVA-PECH kaj ĝi estas ligita al la internacia Foiro de filatelistoj kaj kolektantoj en Prago.

EKOTUR en Dobřichovice 2011-09-11/18: Jam tradicia renkontiĝo de piedturistoj kaj biciklantoj kun dumtagaj ekskursoj tra Bohemia Karsto kaj orienta parto de la montetaro Brdy kun komunaj vesperaj programoj. Info: www.kava-pech.cz/ekotur aŭ chrdle@kava-pech.cz

Internacia renkontiĝo de Vikipediistoj en Svitavy 2011-10-27/30: Unika internacia renkontiĝo de kontribuantoj al esperanta Vikipedio omaĝe al ĝia dekjariĝo. Okazos dum ĝi prelegoj, seminarioj, laborgrupoj, instruado por komencantoj, urbotravigado, ekskurso al ĉarma renesanca urbo Litomyšl, kultura programo. La programo okazos en eleganta medio de Esperanto-Muzeo en Svitavy kaj en komputila klasĉambro de la loka bazlernejo. Info: evikimano@gmail.com

Internacia Esperanto-Konferenco (de OSIEK) en Svitavy 2012-07-14/20: La temo de la konferenco, kiu okazos jam trian fojon en Ĉeĥio (post Strážnice 2001 (Karolo Piĉ kaj lia mondo) kaj Prago 2003 (Intimaj temoj en Esperanto-beletro), estos ĉi-foje „Sciencfikcio kaj robotoj“. Okaze de tiu konferenco la eldonejo KAVA-PECH preparas luksan eldonon de la dramo R.U.R. en kiu Karel Čapek unuan fojon uzis la terminon „robot“ por artefarita homsimila estaĵo, kiun sekve transprenis preskaŭ ĉiuj lingvoj en la mondo kaj laŭ kiu eĉ nomiĝas scienca branĉo „robotiko“. Info: chrdle@kava-pech.cz

4. ĈEĤAJ ESPERANTO-KLUBOJ JUBILEAS

Atendas nin festenoj de jubileoj ĉe minimume du Esperanto-klubo:

En Brno: Esperanto-klubo de Brno festos sian 110-jariĝon sabate la 21-an de majo 2011 inter la 10-a kaj 17-a horo en Občanský klub, Hybešova 65a (du tramhaltejoj de la fervoja stacidomo). Al vizitantoj ni povas proponi tranokton en proksima Starobrněnská ubytovna

<http://www.starobrnenska-ubytovna.com/?id=cenik> Hybešova 46. La programon inaŭguros koncerto de Miroslav Smyčka, poste sekvos prelegoj pri la historio, nuntempo kaj estonteco de la klubo (Malovec, Hršel, Hruška, Lehký, Podhradská, Werner). Vian intereson anoncu al malovec@volny.cz

En Olomouc: Centjariĝon festos la Esperanto-klubo en Olomouc la 11-an de junio 2011 per antaŭtagmeza solena programo ĉe Esperanto-monumento en la parko de Smetana kun la sekva gvidata urbocentro-trarigado kaj posttagmeza solena koncerto. Inter tiuj du solenaĵoj estas planata komuna tagmanĝo. Pli da informoj (ankaŭ pri la tranoktebloj) ĉe dudajanol@centrum.cz

Se ankaŭ via klubo planas festi iun „rondan“ jubileon, bv. sendi informon al chrdle@kava-pech.cz, por ke ĝi povu aperi en venontaj retkomunikoj.

5. AdE-KONSULTEJO JE DISPONO

Eĉ la plej sperta uzanto de ajna lingvo iam ekhezitas, eĉ en la gepatra lingvo, do certe ankaŭ en Esperanto. Ni do rememorigas ke la Akademio de Esperanto jam en 1999 starigis sekcion Konsultejo (kvankam ĝis 2007 ĝi nomiĝis „komisiono“). Ĉiu Esperanto-uzanto povas turni sin al la Konsultejo kun difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. Demandojn pri vortfarado (novaj nocioj, terminoj) la Konsultejo povas respondi relative rapide; komplikaj gramatikaj problemoj kutime postulas pli longan tempon. La respondoj ne estas decidoj de la Akademio de Esperanto, sed rekomendoj de la Konsultejo; tamen la Akademio esperas, ke utilas tiu ĉi rapida servo, pri kies manko oni ofte plendis.

Pli da informoj kaj la demandoformularon vi trovos ĉe <http://www.akademio-de-esperanto.org/konsultejo>, aliajn demandojn pri AdE ĉe <http://www.akademio-de-esperanto.org>

6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) ŝanĝis sian adreson al "Haškova 2, CZ-63800 Brno" (ne plu Světlá nad Sázavou), decide de ekstervica ĝenerala asembleo kunveninta la 22-an de marto en Prago (5 ĉeestantoj). Telefona kontakto estas +420-728864870 (Daniel MRÁZEK), retpaĝaro <http://cej.esperanto.cz/> (aŭ <http://mladez.esperanto.cz/>).

Mezaprile ĈEJ- kaj SKEJ-anoj kunvenis dum laborbrigado en esperanto-arĥivo en Plevník (Slovakio) kadre de la neformala grupiĝo "ĈESKEJ". Inter 22 partoprenantoj estis ankaŭ gastoj el Vroclavo. Komencaprile Miroslav HRUŠKA ĉeestis Sablan printempon en Milevsko, mezmarte Vít MIŠUREC kaj Vlasta PIŠTÍKOVÁ partoprenis JER en Velem (Hungario). Al januara slovaka renkontiĝo Poludnica kontribuis Marek BLAHUŠ. La novjaran renkontiĝon JES en germana Burg (Spreewald) ĉeestis 7 ĉeĥoj, ukraina grupo poste gastis en Prago. Ĝis nun 4 ĉeĥaj junuloj intencas iri somere al IJK (Kievo), 3 al SES (Nitra) kaj 1 al UK (Kopenhago).

ĈEJ asistis al Kateřina HOVORKOVÁ, studentino en Plzeň, kun sociologia esploro por bakalaŭra disertaĵo pri ĉeĥaj esperantistoj. Mezmarte en Centro por la familio en Uherské Hradiště okazigis

Anna BLAHUŠOVÁ prezenton de esperanto, reklamitan en Radio Proglas, kun 3 vizitintoj. En venezuala lingvistik-studenta revuo El Archifonema n-ro 10 publikiĝis hispanigita raporto de Marek BLAHUŠ pri GIL-konferenco el revuo Esperanto. Tutpaĝan intervjuon kun li aperigis la 16-an de marto flandra kristana gazeto Tertio (eldono 13.000), menciante esperanton.

Daniel MRÁZEK nomumiĝis redaktoro de TEJO Tutmonde, nove movada rubriko en revuo Kontakto. Dáša CHVÁTALOVÁ ekde oktobro ĉiusemajne instruas esperanton en bazlernejo en Lípa (distr. Havlíčkův Brod). Mirek HRUŠKA februare gastis ĉe Marek BLAHUŠ en Nancio (Francio).

Marek BLAHUŠ finas sian staĝon en E@I kaj komencaj revenas al Ĉeĥio. En 2011 li laborvojaĝis al Belgio (biblioteko Kortrijk, lingva festivalo Leuven), Lazura marbordo (esperanto-instruado), Pollando (lingvokonferenco en Poznań kun esperantista partopreno), Bretonio (esperanto-instruado) kaj Strasburgo (prelego pri Vikipedio en esperanto samtempe interpretata en la francan). Ricevinte stipendion de Wikimedia Foundation, li aŭguste ĉeestos tutmondan vikipedian konferencon Wikimania en Hajfo (Israelo).

7. MALLONGE

MIGRA EKSPozICIO: Migra ekspozicio „Ĉu esperanto estas morta lingvo?“ estos dum la tuta majoj vizitebla en Urba biblioteko Pelhřimov kaj dum junio en Urba biblioteko Jindřichův Hradec. En aŭgusto kaj septembro vi povos ĝin viziti en Elbregiona muzeo en Poděbrady.

EKSPozICIO EN MORAVSKÉ BUDĚJOVICE: La 28-an de aprilo okazis en Moravské Budějovice inaŭguro de la ekspozicio „Otokar Březina kaj Esperanto“. Krom la esperantigitaj verkoj de O. Březina kaj dokumentoj pri li oni povas vidi i.a. 20 desegnaĵojn de Blanka Zubová pri la temo „Unu lingvo sufiĉas“.

VIZITADU WWW.ESPERANTO.CZ: Ni invitas vin al regula vizitado de nia retejo: inter aktualaĵoj troviĝas freŝa numero de la vikirevuo MOZAIKO, novaj Ipernity-albumoj pri d-ro Zamenhof kaj pri Komenio k.a.

EN POLIČKA: okazos la Esperanto-renkontiĝo la 28-an de majo 2011. La partoprenantoj vizitos inter alie entreprenon por purigado de semoj. Pli da informoj ĉe hermonova@email.cz

8. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANĜOJ EN ĈEĤIO – peto pri informoj

Esperable tre baldaŭ estos dissendita sekva numero de la ĈEA-retkomunikoj, en kiu ni planas denove aperigi kompletan kalendaron de Esperanto-aranĝoj. Konkizan informon pri via (ankaŭ loka) Esperanto-aranĝo bv. sendi laŭeble baldaŭ al la retadreso chrdle@kava-pech.cz. Ĝi enhavu la nomon de la aranĝo, lokon, tago(j)n, kaj retan kontaktadreson.

Atentu, ke iam ajn vi povas konsulti la kalendaron de Esperanto-aranĝoj en Ĉeĥio kaj plej proksima ĉirkaŭaĵo ĉe www.esperanto.cz kaj, en la tutmonda skalo, ĉe www.eventoj.hu